

II

Problema da Linguagem na Espiritualidade

Na esfera imediata à moradia humana, porém, o problema da linguagem é daqueles que mais nos afligem o senso íntimo.

O idioma simbólico prevalece, com efeito, para as grandes comunidades dos Espíritos em mais nobre ascensão.

O império da arte pura é aí a sublimação permanente da Natureza.

A música diviniza a frase e a pintura acrisola a imagem, esculpindo-se *monumentos que falam* e gravando-se *poemas que fulguram*, através da associação de cores e sons, no assombroso quimismo do pensamento.

Entretanto, essa residência de numes, semelhante aos Campos Elísios da tradição mitológica, situa-se muito além do lar humano em que nos florescem as esperanças.

Ainda aqui, aos milhões, não obstante se nos descerrem horizontes renovadores, achamo-nos separados pela barreira lingüística.

II

Lingva Problemo en la Spirita Mondo

Sed en la sfero plej proksima al la Tero la lingvoproblemo apartenas al la nombro de tiuj, kiuj plej afliktas nian konsciencan.

Efektive, la simbola lingvaĵo estas plej grava por la grandaj kolektivoj de la Spiritoj noble progresintaj.

La regado de la pura arto estas tie la senĉesa sublimiĝo de la Naturo.

La muziko diigas la frazon kaj la pentrarto rafinas la figuron; skulptiĝas elokventaj monumentoj kaj gravuriĝas fulmobrilaj poemoj, per la asociiĝo de koloroj kaj sonoj, ĉe la miregiga kemio de la penso.

Tiu loĝejo de numesoj, simila al la Kampoj Eliziaj de la mitologia tradicio, situas tamen multe transe de la homa hejmo, kie floras la esperoj.

Eĉ tie ĉi, kvankam malfermiĝas milionoj da renovigaj horizontoj, ni tamen estas disigitaj de la lingva baro.

Vanguardeiros do progresso, como é justo, adquirem contacto com idiomas nobres ou dominam dialetos, ali e acolá; isso, no entanto, com reduzido rendimento no trabalho educativo que se propõem efetuar.

Para isso, os mais credenciados, do ponto de vista moral, reencarnam-se nos países e regiões que lhes granjeiam devoção afetiva, com sacrifício participando do patrimônio cultural que os caracteriza, gastando decênios para a esses torrões ofertar esse ou aquele recurso de aperfeiçoamento às próprias concepções.

Isso porque a palavra pronunciada ou escrita é e será ainda, por milênios, o agente de transmissão dos valores do espírito, estabelecendo a comunhão das almas, a caminho da Grande Luz, nas zonas de aprendizado em que se nos desenvolvem as lutas evolutivas.

Pioniroj de la progreso, ili laŭbezone kontaktas kun noblaj idiomoj aŭ superregas dialektojn tie kaj ĉi tie. Tion tamen ili efektivigas kun reduktita profito en la eduka laboro, kiun ili celas realigi.

Por tio, la plej kapablaj, el la morala vidpunkto, reenkarnegas en la landoj kaj regionoj, kiuj dediĉas al ili ian korinklinon, oferante sin por la kultura havaĵo ilin karakterizanta, konsumante jardekojn por ke tiuj regionoj liveru al siaj konceptoj mem tiun aŭ alian rimedon por ilia pliboniĝo.

Tio okazas, ĉar la parolo eldirita aŭ skribita ankoraŭ estas aŭ estos dum jarmiloj la agente de transsendo de la spiritaj valoroj, stariganta la kuniĝon de la animoj sur la vojo al la Granda Lumo, en la regionoj de la lernado, en kiuj efektiviĝas la evoluaj luktoj.